

Donaco de Jakob Dieterich, Neubau, Nd. V.

82/
31

PREĜARETO


POR

KATOLIKOJ

PERMIS D'IMPRIMER :

Paris, le 4 Août 1902.

H. ODELIN, *vic. gén.*



Traduko aprobita de D^{ro} Zamenhof.

Cette mention, qui ne vise que la correction de la langue, figure ici avec la permission de la Maison Hachette, seule autorisée par le Docteur Zamenhof, auteur de la langue internationale Esperanto, à publier les ouvrages approuvés par lui et portant mention de cette approbation.



PREĜARETO
POR
KATOLIKOJ

PETIT RECUEIL DE PRIÈRES
POUR CATHOLIQUES

Traduit en Esperanto

PAR
L. DE BEAUFONT

—
DEUXIÈME ÉDITION



PARIS
LIBRAIRIE CH. POUSSIELGUE
RUE CASSETTE, 15

—
1902




701694-7. Esp.




AVERTISSEMENT DE L'ÉDITEUR




En offrant au public ce *Petit Recueil de Prières en Esperanto*, nous espérons rendre service au clergé et aux savants qui peuvent avoir besoin d'user de ce langage dans leurs relations internationales. Nous pensons faire œuvre pratique, particulièrement pour les Communautés d'hommes et de femmes ayant des maisons à l'étranger. Les relations entre les sujets de nationalité différente seront particulièrement simplifiées par l'usage d'une langue qu'une étude simple et facile peut rendre rapidement familière à tous.





PRÉFACE



Organe neutre pour tous, venant se mettre, non point à la place, mais à côté de nos langues, l'ESPERANTO ne doit se préoccuper ni des opinions religieuses ou politiques, ni de la couleur des drapeaux.

Lien commun des nations, il ne peut, en vertu de sa nature même, s'inféoder à aucune croyance, à aucun parti, à aucun peuple : c'est le bien de tous. Mais précisément parce que chacun y a droit, nos amis de religion différente ne sauraient s'étonner de ce que, catholique, j'aie pensé à mes coreligionnaires et aie voulu leur donner le moyen de louer Dieu dans cette langue, fille ou sœur des nôtres. Ils ne se méprendront pas sur mon but qui, s'il est de foi,

n'est pas d'intolérance. Ils comprendront sûrement que, même en écartant toute pensée religieuse (dont certes je ne me défends pas), j'avais, dans les prières quotidiennes, un excellent moyen de propagande qu'il ne fallait pas négliger. Auprès des néo-latins surtout, et des bons catholiques français en particulier, elles plaideront notre cause d'une manière autrement efficace que ne le feraient les explications les plus claires et les plus chaleureux discours.

La facilité avec laquelle ils suivront ces prières, dont le texte leur est familier, les portera naturellement à faire plus ample connaissance avec une langue qu'ils comprennent si aisément sans l'avoir apprise. Pour beaucoup d'adeptes, elles seront d'ailleurs un excellent moyen de s'assimiler sans peine les principes de l'ESPERANTO et un grand nombre de ses mots. Enfin,

tous trouveront sans doute quelque plaisir à louer le Seigneur dans cet idiome, où l'harmonie des sons le dispute à la justesse et à la clarté de l'expression, à la souplesse de la forme, à la liberté de l'allure, et à je ne sais quel charme naïf ressuscité des langues antiques.

Les fragments bibliques adjoints aux prières, sublimes prières eux-mêmes, permettront d'apprécier la valeur littéraire de la langue. On y constatera avec quelle aisance et quelle fidélité l'ESPERANTO rend, dans ses moindres traits, la physionomie de nos textes saints, et cela sans déroger ni ajouter aux **seize règles** de sa grammaire, sans changer d'un iota la composition de ses mots. « Qui peut le plus, peut le moins », dit un proverbe. Par conséquent, si la langue arrive à traduire ainsi, mieux que les trois quarts des nôtres, une littérature justement ré-

putée comme la plus difficile à reproduire, on est en droit de conclure qu'elle ne sera pas inférieure pour des œuvres plus faciles à rendre, originales ou non.

Du reste, sur ce point comme sur bien d'autres, l'ESPERANTO a déjà fait ses preuves, et les échantillons littéraires qu'il a fournis et qu'il fournit chaque jour, dans des genres très divers, montrent assez que son extrême simplicité, loin de lui fermer le domaine des lettres, le prédestine au contraire à y exceller¹.

La constitution de la langue se prêtant à l'inversion sans la moindre obscurité possible, nous en avons naturellement profité pour suivre pas à pas

1. Cette préface date du mois de mai 1893. Les personnes au courant de la littérature Esperanto peuvent constater que notre jugement n'avait rien d'exagéré. Quant aux nouveaux adeptes, la lecture du seul ouvrage *Esperantaj Prozaĵoj* les en convaincra certainement.

notre texte, dans les fragments bibliques surtout. L'ordre des mots influe toujours plus ou moins, en effet, sur le sens d'un texte; car il est incontestable que certaines constructions ne sont nullement arbitraires ni un pur effet d'euphonie. On doit donc les respecter, dans toute la mesure possible, sous peine de mettre inconsciemment dans l'ombre, ou de nuancer faussement l'idée que l'auteur voulait en pleine lumière ou présentait sous une autre couleur.

Nous avons traduit sur la Vulgate les passages que nous donnons de la Bible. Mais nous nous sommes reporté aux originaux grec et hébreu pour le choix de tel ou tel sens, entre plusieurs possibles, pour le nombre de certains mots, enfin pour l'article que le latin n'a pas.


Si nous suivons jusqu'à l'ordre des mots, nous pratiquons encore plus,

dans notre version, le principe d'une littéralité rigoureuse. Nous n'estimons pas qu'un traducteur ait le droit d'altérer en quoi que ce soit la physionomie de son texte, fût-ce pour l'embellir, s'il peut la rendre d'une manière absolument fidèle. Or, avec l'ESPERANTO c'est un jeu. Cependant, nous n'avons pas cru que cette règle dût s'étendre jusqu'à faire passer dans la langue une image que notre esprit rectifie en français, mais que repousse la logique en ESPERANTO. Nous ne disons donc pas, dans la prière du soir : « J'ai poussé trop loin ma malice et mon ingratitude... » Nous remplaçons cette expression par sa correspondante naturelle : « J'ai laissé trop croître, trop grandir, etc. »¹

1. Nous tenons à remercier ici notre ami et collaborateur M. Th. Cart, qui s'est occupé tout spécialement de la présente édition.

Puisse ce tout petit livre servir à rendre plus pieux l'hommage journalier de quelqu'un de nos frères envers notre commun Maître et Seigneur! Puisse-t-il aussi coopérer largement à la diffusion de notre chère langue!

« Volu Dio ġin beni! »



LA PRIÈRE



Lamennais.

Quand vous avez prié, ne sentez-vous pas votre cœur plus léger et votre âme plus contente?


La prière rend l'affliction moins douloureuse et la joie plus pure : elle mêle à l'une je ne sais quoi de fortifiant et de doux, et à l'autre un parfum céleste.

Que faites-vous sur la terre, et n'avez-vous rien à demander à Celui qui vous y a mis?

Vous êtes un voyageur qui cherche la patrie. Ne marchez point la tête baissée : il faut lever les yeux pour reconnaître sa route.

Votre patrie, c'est le ciel; et quand vous regardez le ciel, est-ce qu'en vous il ne se remue rien? est-ce que nul

LA PRÊGO¹



El Paroles d'un Croyant.

Kiam vi preĝis, ĉu vi ne sentas vian koron pli malpeza kaj vian animon pli kontenta?

La preĝo faras la malĝojon malpli dolora kaj la ĝojon pli pura : ĝi miksas al la unua mi ne scias kion fortigantan kaj dolĉan, kaj al la dua ian bonodoron ĉielan.

Kion vi faras sur la tero, kaj ĉu vi havas nenion por peti al Tiu, kiu vin metis sur ĝin?

Vi estas vojaĝanto, kiu serĉas la patrujon. Ne marŝu kun kapo malle-vita : oni devas levi la okulojn por rekoni sian vojon.

Via patrujo, ĝi estas la ĉielo; kaj kiam vi rigardas la ĉielon, ĉu nenio sin

1. Pour la prononciation, voir à la page 55.

désir ne vous presse? ou ce désir est-il muet?

Il en est qui disent : A quoi bon prier? Dieu est trop au-dessus de nous pour écouter de si chétives créatures.

Et qui donc a fait ces créatures chétives? Qui leur a donné le sentiment, et la pensée, et la parole, si ce n'est Dieu?

Et s'il a été si bon envers elles, était-ce pour les délaissier ensuite et les repousser loin de Lui?

En vérité, je vous le dis, quiconque dit dans son cœur que Dieu méprise ses œuvres, blasphème Dieu.

Il en est d'autres qui disent : A quoi bon prier? Dieu ne sait-il pas mieux que nous ce dont nous avons besoin?

Dieu sait mieux que vous ce dont vous avez besoin, et c'est pour cela qu'il veut que vous le lui demandiez : car Dieu est lui-même votre premier besoin, et PRIER DIEU C'EST COMMENCER A POSSÉDER DIEU.

movas en vi? ĉu nenia deziro vin premas? aŭ ĉu estas muta tiu ĉi deziro?

Estas homoj, kiuj diras : « Por kio servas preĝi? Dio estas tro alte super ni por aŭskulti kreitojn tiel mizerajn! »

Sed kiu do faris tiujn mizerajn kreitojn? Kiu donis al ili la sentadon, kaj la pensadon, kaj la parolon, se ne Dio?

Kaj se Li montris sin tiel bona al ili, ĉu ĝi estis por ilin poste forlasi kaj forĵeti malproksimen de Li?


Certe mi diras al vi : kiu ajn pensas en sia koro, ke Dio malestimas Siajn faritaĵojn, tiu blafestas Dion.

Estas aliaj, kiuj diras : « Por kio servas preĝi? Ĉu Dio ne scias pli bone ol ni, kion ni bezonas? »

Pli bone ol vi Dio scias, kion vi bezonas, kaj tial volas, ke vi ĝin petu de Li; ĉar Dio estas mem via unua bezono, kaj **PREĜI DION ESTAS KOMENCI POSEDI DION.**


Le père connaît les besoins de son fils : faut-il à cause de cela que le fils n'ait jamais une parole de demande et d'actions de grâces pour son père ?

Quand les animaux souffrent, quand ils craignent ou quand ils ont faim, ils poussent des cris plaintifs. Ces cris sont la prière qu'ils adressent à Dieu, et Dieu l'écoute. L'homme serait-il donc dans la création le seul être dont la voix ne dût jamais monter à l'oreille du Créateur ?



La patro ja konas la bezonojn de sia filo : ĉu, pro tio, la filo devas neniam elparoli unu vorton de peto kaj de danko por sia patro?

Kiam la bestoj suferas, kiam ili timas aŭ malsatas, ili plende kriadas. Tiuj kriadoj estas la preĝo, kiun ili prezentas al Dio, kaj Dio ĝin aŭskultas. Ĉu do, en la kreitaro, la homo estus la sola estaĵo, kies voĉo suprenflugus neniam al la orelo de l'Kreinto?



FIAT! FIAT!

Dédié à Sa Sainteté le Pape Léon XIII, à l'occasion du jubilé célébré pour le cinquantième anniversaire de son épiscopat.

Laudate Dominum omnes gentes
laudate eum omnes populi.

(Psaume 116, 1.)

Louez toutes Dieu, races de la terre,
Peuples, louez tous le Seigneur!
Élevez vers le ciel votre cœur d'airain,
Reconnaissez que vous êtes vraiment frères.

Vous n'avez qu'une civilisation,
Vous avez une terre, une atmosphère commune
Au-dessus de vos têtes un seul globe solaire,
Et dans le ciel un seul Père — Dieu!

Pourquoi donc n'écoutez-vous pas sa voix?
Pourquoi n'accomplissez-vous pas la volonté du Père?
Pourquoi ne brisez-vous pas l'idole de Baal?
Pourquoi vous injuriez-vous l'un l'autre?

ESTU! ESTU!

Versaĵo dediĉita al Lia plej sankta Mosto, Leono XIII, je l'okazo de Lia kvindekjara episkopeca jubileo.

Laudate Dominum omnes gentes,
laudate eum omnes populi.

(*Psalm. CXVI, 1.*)

Laŭdadu Dion, ĉiuj rasoj teraj,
Laŭdadu, ĉiuj popoloj, Sinjoron!
Levu do supren vian feran koron,
Rekonu, ke vi estas fratoj veraj.

Vi havas unu civilizacion,
Vi havas teron, aeron komunan,
Super la kapoj unu globon sunan,
Kaj en la ĉielo unu Patron — Dion!

Kial do Lian voĉon ne aŭskultas?
Kial vi Patran ne plenumas volon?
Kial ne rompas Baalan idolon?
Kial vi unu alian insultas!

De fait, le Christ a dit : voici mon ordre,
Comme j'ai agi, ainsi agissez,
Aimez-vous l'un l'autre du fond du cœur,
Car la haine vient du mal...

Et — pour le salut du monde tout entier —
Lui, divin Agneau, a porté une lourde croix,
Pour vous Il a souffert, pour vous tous il est mort,
Répandant son sang jusqu'à la dernière goutte.

Et Il a envoyé ses Apôtres,
Leur disant : Annoncez la bonne nouvelle,
Faites-la connaître à toute créature,
Allez, enseignez tous les peuples!

Allez, appelez-les tous au repentir :
La puissante Rome avec l'Inde sans force,
Et le Nord neigeux et le Sud fleurissant,
L'Orient ainsi que l'Occident!...

Et, fait admirable! Partout aussitôt
L'humanité entendit la parole évangélique, —
Le Grec vit un frère dans le barbare
Et tous deux se mirent à louer le Christ sauveur.

Mais à présent que faites vous, ô peuples,
Vous, fidèles du Christ, si instruits?...
Au lieu de paix — des guerres entre vous,

Kristo ja diris : Jen mia ordono :
Kiel mi agis, vi tiel agadu,
Unu alian korege amadu,
Ĉar la malamo venas de malbono...

Kaj — por la savo de la mondo tuta —
Li, Dia ŝafo, pezan krucon portis,
Por vi suferis, por vi ĉiuj mortis,
Verŝante sangon ĝis la lasta guto.

Kaj Li elsendis Siajn apostolojn,
Dirante : Bonan anoncu novaĵon,
Sciigu ĉiun pri ĝi kreitaĵon,
Iru kaj ĉiujn instruu popolojn!

Iru kaj ĉiujn vokadu al pento
Kaj fortan Romon kaj malfortan Indon,
Kaj neĝan Nordon, kaj florantan Sudon,
Kaj Orienton kun la Okcidento!...

Kaj mira fakto! Ĉie tuj ekaŭdis
Evangelian vorton la homaro, —
Ekvidis Greko fraton en barbaro
Kaj ambaŭ Kriston savinton eklaŭdis.

Sed nune kion vi faras, popoloj,
Vi kristamemaj, tiel instruitaj?...
Anstataŭ paco — inter vi militoj,

Au lieu d'amour — rien que de belles paroles!...

Vous vous déchirez sans pitié les uns les autres,

Tourmentez constamment les races faibles,

Vous efforçant d'en effacer le nom,

Et de la sorte vous allez tous à votre perte...

Oh! devenez sages, vous toutes, races de la terre!

Peuples, mettez-vous à louer le Seigneur!

Élevez, oh! élevez votre cœur vers le ciel,

Reconnaissez que vous êtes vraiment frères.

Qu'il n'y ait plus parmi vous de batailles,

Choisissez-vous comme unique but sacré :

De ne rechercher que le vrai, le bon, le beau,

De ne tendre toujours qu'à l'idéal.

Qu'apparaisse maintenant le plein règne de Dieu,

Un seul troupeau sous un seul Pasteur,

Qu'apparaisse, embrassant tous les peuples,

Une seule Église chrétienne universelle!...

Ce pieux appel à l'amour de Dieu et du prochain, à la fusion chrétienne de tous les peuples dans le sein de l'Église catholique, a été spécialement composé pour le **Preġareto** par M. l'abbé DOMBROWSKI, actuellement secrétaire de Mgr l'évêque de Kovno. Nous lui devons donc la place d'honneur que nous sommes heureux de lui donner.

Anstataŭ amo — nur belaj paroloj!...

Unu alian vi senkore ŝiras,
Malfortajn rasojn turmentas konstante,
Detruu nomon ilian penante,
Kaj tiel ĉiuj al pereco iras...

Ho! prudentiĝu, ĉiuj rasoj teraj!
Komencu laŭdi, popoloj, Sinjoron!
Levu, ho! levu supren vian koron,
Rekonu, ke vi estas fratoj veraj.

Kaj jam ne estu inter vi bataloj,
Elektu unu por vi sanktan celon :
Serĉadi sole veron, bonon, belon,
Flugadi ĉiam nur al idealoj.

Aperu plena regno nun de Dio,
Unu ŝafaro sub unu Paŝtanta,
Ĉiujn popolojn en si enhavanta,
Unu kristana ĉiueklezio!...


P. A. DOMBROWSKI

Pastro Katolika.


19. II. 1893. Ustjuĝna

Novgoroda. gub.

(*Rusujo*).




PREĜOJ KOMUNAJ



PATER NOSTER.

PATRO nia, kiu estas en la ĉielo, sankta
estu Via nomo; venu reĝeco Via;
estu volo Via, kiel en la ĉielo, tiel
ankaŭ sur la tero. Panon nian ĉiutagan
donu al ni hodiaŭ; kaj pardonu al ni
ŝuldojn niajn, kiel ni ankaŭ pardonas
al niaj ŝuldantoj; kaj ne konduku nin
en tenton, sed liberigu nin de la mal-
bono. Amen.

(Tradukita de Dokotoro ZAMENHOF mem.)




AVE MARIA.

MI vin salutas, Mario, plena je favo-
roj, la Sinjoro estas kun vi; vi

estas benata inter la virinoj, kaj estas benata la frukto de via ventro Jesuo.

Sankta Mario, Dipatrino, preĝu por ni pekuloj, nun kaj en la horo de nia morto. Amen.



CREDO.

1. **M**i kredas en Dio, Patro ĉiopova, kreinto de l'ĉielo kaj de l'tero;
2. Kaj en Jesuo Kristo, lia sola Filo, nia Sinjoro;
3. Kiu estis embriigita el la Spirito Sankta, naskita de Mario Virga;
4. Suferinta sub Poncio Pilato, krumcumita, mortinta kaj entombigita;
5. Malsupreniris al la infero; la trian tagon reviviĝis el la mortintoj;
6. Supreniris al la ĉielo; sidas je l'dekstro de Dio, la Patro ĉiopova;

7. De kie Li venos por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.
8. Mi kredas en la Spirito Sankta,
9. La sankta Eklezio katolika, la kuneco de l'Sanktuloj,
10. La pardono de l'pekoj,
11. La reviviĝo de l'korpo,
12. La vivo eterna. Amen.




CONFITEOR.

MI konfesas al Dio ĉiopova, al la feliĉega Mario ĉiam virga, al la feliĉega Miĥaelo ĉefanĝelo, al la feliĉega Johano Baptisto, al la sanktaj Apostoloj Petro kaj Paŭlo, al ĉiuj Sanktuloj (kaj al vi, Patro), ke mi pekis multege per penso, parolo kaj faro, el mia kulpo, el mia kulpo, el mia tre granda kulpo. Tial mi petas la feliĉegan Marion ĉiam virgan, la feliĉegan Miĥaelon ĉefanĝe-

lon, la feliĉegan Johanon Baptiston, la sanktajn Apostolojn Petron kaj Paŭlon, ĉiujn Sanktulojn (kaj vin, Patro) preĝi por mi nian Sinjoron Dion.

Kompatu al ni la ĉiopova Dio kaj, pardoninte niajn pekojn, Li alkonduku nin al la vivo eterna. Amen.


Indulgon, absolvon kaj pardonon pri niaj pekoj donacu al ni la ĉiopova kaj kompatema Sinjoro. Amen.



ORDONOJ DE DIO.

1. Sole Dion vi adoros,
Kaj vi amegos perfekte.
2. Vane vi Dion ne ĵuros,
Nek eĉ alion simile.
3. La dimanĉojn vi observos,
Servante Dion tre pie.
4. La gepatrojn vi honoros,
Por ke vi vivu tre longe.


5. Mortiganto vi ne estos,
Per la fakto aŭ intence.
6. Malĉasta vi ne fariĝos,
Per la korpo aŭ spirite.
7. Havon malpropran ne prenos,
Nek konservos vi sciante.
8. Malvere vi ne atestos
Kaj vi mensogos tute ne.
9. La edzaĵon vi deziros
Nur en la edzeco sole.
10. De l'proksimul' ne avidos
Ian proprajon maljuste.



ORDENOJ DE LA EKLEZIO.


1. **L**a festojn vi solenigos,
Kiel estas ordonite.
2. Dimanĉe vi meson aŭdos,
Kaj en la festoj egale.
3. Ciun pekon vi konfesos,
Ne malpli ol ĉiujare.

4. Vian Kreinton ricevos
En Pasko almenaŭ pie.
5. Kvartempojn, Vigilojn fastos,
Kaj la Grandan Faston tute.
6. Vendrede ne viandmanĝos,
Nek en sabato egale.



ESPRIMADO DE KREDO.

MIA Dio, mi kredas fortike ĉiujn verojn, kiujn al ni Vi malkovris kaj pri kiuj vi instruas nin per Via Eklezio, ĉar Vi ne povas erari nek trompi nin.



ESPRIMADO DE ESPERO.


MIA Dio, mi esperas kun forta konfido, ke Vi donacos al mi, pro la meritoj de Jesuo Kristo, Vian favoron en tiu ĉi mondo, kaj, se mi observos

Viajn ordonojn, gloron Vian en la alia.
ĉar Vi estas supere fidela je Viaj pro-
mesoj.




ESPRIMADO DE AMO.

MIA Dio, mi Vin amas el mia tuta
koro kaj super ĉio, ĉar Vi estas
senlime bona, senlime aminda; kaj mi
amas mian proksimulon kiel min mem
pro la amo al Vi.



ESPRIMADO DE PENTO.

MIA Dio, mi bedaŭras ekstreme, ke
mi Vin ofendis, ĉar Vi estas senli-
me bona, senlime aminda, kaj ĉar la
peko malplaĉas al Vi, mi decidas for-
tike, per Via sankta favoro, pli ne
ofendi Vin kaj pentofari.



ANGELUS.

ANGELO de l'Sinjoro anoncis al Mario,
kaj ŝi gravediĝis de la Spirito
Sankta.

Mi Vin salutas, k. t. p.


Jen estas la servantino de l'Sinjoro;
fariĝu al mi laŭ via parolo.

Mi Vin salutas, k. t. p.


Kaj la Vorto fariĝis korpo kaj loĝadis
inter ni.

Mi Vin salutas, k. t. p.

Ni preĝu — Vian favoron enverŝu en
niajn animojn, Sinjoro; por ke de la
Angelo anoncanta sciiginte la Korpi-
ĝon de Kristo Via Filo ni estu alkon-
dukitaj, per Lia suferado kaj kruco, al
la gloro de l'reviviĝo. Amen.



PREĜOJ DE L'MATENO



En la nomo de l'Patro, kaj de l'Filo, kaj de
l'Spirito Sankta. Amen.

NI REMEMORIĜU PRI LA APUDESTO
DE DIO KAJ NI ADORU LIAN SANKTAN NOMON.

Très Sainte, etc.


TRE sankta kaj tre majesta Triunuo,
Dio sola en tri personoj, mi kreas,
ke Vi apudestas tie ĉi. Mi Vin
adoras en la sentoj de la plej profunda
humiliĝo, kaj esprimas al Vi, el mia
tuta koro, la submetiĝon devatan al
Via plejalta majesto.



NI DANKU DION PRO LA FAVOROJ,
KIUJN AL NI LI DONACIS,
KAJ NIN PROPONU AL LI.

Mon Dieu, je vous remercie....


MIA Dio, mi Vin dankas tre humile pro ĉiuj favoroj, kiujn al mi Vi donacis ĝis tiu ĉi momento. Ankoraŭ el efikataĵo de Via boneco mi vidas tiun ĉi tagon; mi tial volas uzi ĝin sole por servi al Vi. Mi dediĉas al Vi ĉiun penson, parolon, faron kaj penon en ĝia daŭro. Ilin benu, Sinjoro, por ke inter ili troviĝu nenia, kiu ne estus animita de Via amo, kaj ne celus Vian pli grandan gloron.



NI DECIDU EVITI LA PEKON KAJ PRAKTIKI
LA VIRTON.

Adorable Jésus....

ADORINDA Jesuo, Dia modelo de l'perfekteco, kiun ni devas deziri, mituj ekzercos min, kiom mi povos, fariĝi simila je Vi, dolĉa, humila, ĉasta, fervora, pacienca, afabla, kaj rezignacia kiel Vi. Kaj mi direktos aparte ĉiun mian penadon al tio, ke mi ne renovigu hodiaŭ la kulpojn, kiujn tiel ofte mi faras kaj pri kiuj mi sincere deziras korekti min.



NI PETU DION PRI LA FAVOROJ
NECESAJ AL NI.

Mon Dieu, vous connaissez ma faiblesse...

MIA Dio, Vi konas mian malfortecon. Mi povas nenion sen la helpo de

Via favoro. Ne rifuzu ĝin al mi, Dio mia; konformigu ĝin al miaj bezonoj; donu al mi sufiĉe da forteco por eviti ĉiun malbonon, kiun Vi malpermesas, por praktiki ĉiun bonon, kiun Vi atendas de mi, kaj por suferi paciencie ĉiujn malplezurojn, kiujn al Vi plaĉos sendi al mi.

(V. le *Pater* et l'*Ave Maria*, ainsi que le *Credo* et le *Confiteor*, avec les Commandements de Dieu et de l'Église, p. 17.)



NI ALVOKU LA SANKTAN VIRGULINON,
LA BONAN ANĜELON
KAJ LA SANKTAN PATRONON.

Vierge Sainte...


VIRGULINO Sankta, patrino de Dio, mia patrino kaj patronino, mi metas min sub Vian defendon, kaj

konfide ĵetas min en la profundaĵon de Via kompatemo. Estu, patrino de boneco, mia rifuĝo en la bezonoj, mia konsolo en la malĝojoj, kaj mia advokato apud Via adorinda Filo, hodiaŭ, ĉiutage en mia vivo, kaj aparte en la horo de mia morto.


ANGĚLO DE L'ĈIELO, mia fidela kaj bonfara gvidanto, faru, ke mi povu esti tiel obea al viaj inspiroj kaj direkti miajn paŝojn tiel bone, ke neniel mi dekliniĝu de la vojo de l'ordonoj de mia Dio.

GRANDA SANKTULO, kies nomon mi havis la honoron ricevi, protektu min, preĝu por mi, por ke mi povu servi al Dio kiel vi sur la tero, kaj glori Lin eterne kun vi en la ĉielo. Amen.

(V. les Litanies du saint Nom de Jésus, p. 36.)



PREĜOJ DE L'VESPERO




NI REMEMORIGU PRI LA APUDESTO DE DIO;

NI ADORU LIN.

Je vous adore, ô mon Dieu....


MI Vin adoras, Dio mia, kun la submetiĝo, kiun inspiras al mi la apudesto de Via supera grandeco. Mi kredas en Vi, ĉar Vi estas la vero mem. Mi esperas en Vi, ĉar Vi estas senlime bona. Mi Vin amas el mia tuta koro, ĉar Vi estas supere aminda, kaj mi amas mian proksimulon kiel min mem pro la amo al Vi.



NI DANKU DION PRO LA FAVOROJ,
KIUJN AL NI LI DONACIS.

Quelles actions de grâces....


KIAN dankadon mi prezentos al Vi, Dio mia, pro ĉiuj bonoj, kiujn mi ricevis de Vi? Vi pensis pri mi de la tuta eterno; Vi eltiris min el nenio; Vi fordonis la vivon por elaĉeti min, kaj ankoraŭ Vi plenigas min ĉiutage je multego da favoroj. Ho ve! Sinjoro, kion mi povas fari el dankemo pro tiom da bonaĵoj? Unuigu vin kun mi, feliĉegaj Spiritoj, por laŭdi la Dion de l'kompatemo, kiu ne ĉesas bonfari al la plej malinda kaj plej nedankema el ĉiuj Siaj kreitaĵoj.



NI PETU DION PRI LA FAVORO KONI
NIAJN PEKOJN.

Source éternelle de lumière....

ETERNA fonto da lumo, Spirito Sankta,
dispelu la mallumon, kiu kaŝas al
mi la malbonecon kaj malbelecon de
l'peko. Faru, ke mi sentu por ĝi tian
abomenon, ke mi ĝin malamu, se estus
eble, tiom kiel Vi ĝin malamas mem,
kaj ke mi timu nenion tiel same, kiel
fari ĝin en la estonteco.



NI EKZAMENU NIN PRI LA MALBONO FARITA
KONTRAŬ DIO, KONTRAŬ
LA PROKSIMULO, KONTRAŬ NI MEM.

Me voici, Seigneur....

JEN estas mi, Sinjoro, tute plena je
honto kaj penetrata de ĉagreno ĉe

l'vido de miaj kulpoj. Mi venas ilin malamegi antaŭ Vi, kun vera malplezuro, ke mi ofendis Dion tiel bonan, tiel afablan, kaj tiel indan je amo. Ĉu do ĝi estas tio, Dio mia, kion Vi havis la rajton atendi de mia dankemo, tiel aminte min, ke Vi elverŝis Vian sangon por mi? Jes, Sinjoro, mi lasis tro kreski mian malbonecon kaj nedankecon. Mi petas tre humile, ke Vi tion pardonu al mi, kaj mi Vin petegas, Dio mia, pro tiu sama boneco, kies efikataĵojn mi sentis tiom da fojoj, ke Vi donacu al mi la favoron pentofari sincere pri tio, de nun kaj ĝis la morto. Amen.




NI FORTIKE DECIDU PLU NE PEKI.

Que je souhaiterais....

KIEL mi dezirus, Dio mia, ke mi neniam estus ofendita Vin! Sed, ĉar

mi havis la malfeliĉon esti al Vi malagrabla, mi tuj montros al Vi la ĉagrenon, kiun mi sentas el tio, per konduto tute kontraŭa je tiu, kiun mi ĝis nun konservis. De nun mi forlasas la pekon kaj la okazon de l'peko, precipe de tiu, en kiun mi havas la malenergion refali tiel ofte. Kaj se Vi indigos donaci al mi Vian favoron, kiel mi petas kaj esperas, mi penados plenumi fidele miajn devojn, kaj nenio estos kapabla min haltigi, kiam la afero rilatos al Via servo. Amen.

(*Pater, Ave, Credo et Confiteor* p. 17.)




NI PRĜU POR LA VIVANTOJ KAJ POR
LA FIDELULOJ MORTINTAJ.

Répandez, Seigneur....

ELVERŜU, Sinjoro, Vian benadon sur
miajn parencojn, bonfarantojn, ami-

kojn kaj malamikojn. Protektu ĉiujn, kiujn Vi donis al mi kiel estroj, aŭ religiaj, aŭ mondaj. Helpon donu al la malriĉuloj, kaptitoj, ĉagrenataj, vojaĝantoj, malsanuloj kaj agoniantaj. Konvertu la herizistojn kaj lumigu al la nekristanoj.

Dio de boneco kaj de pardonemo, kompatu ankaŭ al la animoj de l'fideluloj, kiuj estas en la purigejo. Faru finon al ilia punado, kaj donu al tiuj, por kiuj mi devas preĝi, la ripozon kaj la lumon eternan. Amen.




NI REKOMENDU NIN AL DIO, AL LA
SANKTA VIRGULINO KAJ AL LA SANKTULOJ.

Bénissez, ô mon Dieu....

BENU, Dio mia, la ripozon al kiu mi nun iras por rebonigi la fortojn, por ke mi servu al Vi pli bone. Virgu-

lino Sankta, Patrino de mia Dio, kaj post Li mia sola espero, mia bona Anĝelo, mia sankta Patrono, petu pro mi, gardu min dum tiu ĉi nokto, la tutan tempon de mia vivo, kaj en la horo de mia morto. Amen.



LITANIOJ

DE L'SANKTA NOMO DE JESUO

SINJORO, kompatu al ni.

SKRISTO, kompatu al ni.

Sinjoro, kompatu al ni.

Jesuo, aŭskultu nin.

Jesuo, atentu nin.

Dio Patro, de la ĉielo kompatu al ni.

Dio Filo, Elaĉetinto de l'mondo, kompatu al ni.

Dio Spirito Sankta, kompatu al ni.

Sankta Triunuo, unu sola Dio, kompatu al ni.

Jesuo, Filo de l'Dio viva, kom-
patu al ni.

Jesuo, brilo de l'Patro,

Jesuo, heleco de l'lumo eterna,

Jesuo, reĝo de gloro,

Jesuo, suno de justeco,

Jesuo, Filo de Mario virga,

Jesuo, aminda

Jesuo, admirinda,

Jesuo, Dio forta,

Jesuo, Patro de l'estonta cent-
jaro,

Jesuo, anĝelo de l'granda kon-
siliĝo,

Jesuo, tre potenca,

Jesuo, tre pacienca,

Jesuo, tre obea,

Jesuo, dolĉa kaj humila kore,

Jesuo, amanto de l'ĉasteco,

Jesuo, amanto nia,

Jesuo, Dio de paco,

Jesuo, aŭtoro de l'vivo,

Jesuo, modelo de l'virtoj,

kompatu al ni.

Jesuo, fervorulo de l'animoj,
Jesuo, Dio nia,
Jesuo, rifuĝo nia,
Jesuo, patro de l'malriĉuloj,
Jesuo, trezoro de l'fideluloj,
Jesuo, bona paŝtisto,
Jesuo, lumo vera,
Jesuo, saĝo eterna,
Jesuo, boneco senlima,
Jesuo, vojo kaj vivo nia,
Jesuo, ĝojo de l'Angeloj,
Jesuo, reĝo de l'Patriarkoj,
Jesuo, instruinto de l'Apostoloj,
Jesuo, doktoro de l'Evangeliiistoj,
Jesuo, forteco de Martiroj,
Jesuo, lumo de l'Konfesintoj,
Jesuo, pureco de l'Virgulinoj,
Jesuo, krono de ĉiuj Sanktuloj,
Favoru, indulgu al ni, Jesuo.
Favoru, atentu nin, Jesuo,
De ĉiu malbono, liberigu nin, Jesuo,
De ĉiu peko,
De Via kolero,

kompatu al ni.

De la kaptiloj de l'diablo,
De l'spirito de malĉasteco,
De l'morto senĉesa,
De malŝato de Viaj inspiroj,
Per la mistero de Via sankta Korpiĝo,
Per Via naskiĝo,
Per Via infaneco,
Per Via vivo tutdia.
Per Viaj laboroj,
Per Via agonio kaj suferado,
Per Via kruco kaj forlasiteco,
Per Viaj senfortiĝoj,
Per Via morto kaj entombigo,
Per Via reviviĝo,
Per Via ĉieliro,
Per Viaj ĝojoj,
Per Via gloro,

Ŝafido de Dio, kiu forprenas la pekojn
de l'mondo, indulgu al ni, Jesuo.


Ŝafido de Dio, kiu forprenas la pekojn
de l'mondo, atentu nin, Jesuo.

Ŝafido de Dio, kiu forprenas la pekojn
de l'mondo, kompatu al ni, Jesuo.

liberigu nin, Jesuo.

Jesuo aŭskultu nin,
Jesuo, atentu nin.

Ni preĝu — Sinjoro Jesuo Kristo,
kiu diris : Petu, kaj vi ricevos; serĉu,
kaj vi trovos; frapu, kaj oni malfermos
al Vi; ne petas, ke Vi donu al ni pre-
ĝantaj la pasion de Via amo tutdia, por
ke per la tuta koro, buŝo kaj faro ni
amu Vin, kaj neniam ĉesigu Vin
laŭdi.



LITANIOJ

DE L'SANKTA VIRGULINO

SINJORO, kompatu al ni.

SKRISTO, kompatu al ni.

SINJORO, kompatu al ni.

KRISTO, aŭskultu nin.

KRISTO, atentu nin.

DIO PATRO, de la ĉielo' kompatu al ni.

DIO FILI, Elaĉetinto de l'mondo, kom-
patu al ni.

Dio Spirito Sankta, kompatu al ni.
Sankta Triunuo, unu sola Dio, kompatu
al ni.

Sankta Mario,
Sankta Naskintino de Dio,
Sankta Virgulin' el la Virgulinoj,
Patrino de Kristo,
Patrino de l'Dia favoro,
Patrino tre pura,
Patrino tre ĉasta,
Patrino nemakulita,
Patrino nedifektita,
Patrino aminda,
Patrino admirinda,
Patrino de l'Kreinto,
Patrino de l'Savinto,
Virgulino tre singarda,
Virgulino respektiginda,
Virgulino proklaminda,
Virgulino potenca,
Virgulino pardonema,
Virgulino fidela,
Spegulo de justeco,

pregadu por ni.

Sidejo de saĝeco,
Kaŭzo de nia ĝojo,
Vazo spirita,
Vazo honorinda,
Vazo rimarkinda de pieco,
Rozo mistika,
Turo de Davido,
Turo elefantosta,
Domo ora,
Kesto de l'kontrakto,
Pordo de l'ĉielo,
Stelo matena,
Savo de l'senfortuloj,
Rifuĝo de l'pekuloj,
Konsolantino de l'ĉagrenataj,
Helpo de l'Kristanoj,
Reĝino de l'Anĝeloj.
Reĝino de l'Patriarkoj,
Reĝino de l'Profetoj,
Reĝino de l'Apostoloj,
Reĝino de l'Martiroj,
Reĝino de l'Konfesintoj,
Reĝino de l'Virgulinoj,

pregadu por ni.

Reĝino de ĉiuj Sanktuloj,
Reĝino sen la devena makulo
embriigita,

Reĝino de l'tre sankta Rozario,
Ŝafido de Dio, kiu forprenas la pekojn
de l'mondo, indulgu al ni, Sinjoro.

Ŝafido de Dio, kiu forprenas la pekojn
de l'mondo, atentu nin, Sinjoro.

Ŝafido de Dio, kiu forprenas la pekojn
de l'mondo, kompatu al ni, Sinjoro.

(Oraison de l'Angelus, p. 24.)




MAGNIFICAT

KANTO DE DANKADO.

PRIKANTEGAS* animo mia la Sinjoron,
Kaj ĝojegas mia spirito* en Dio
savinto mia;

Ĉar Li rigardis la humilecon de
Sia servantino*; jen efektive de nun


nomos min feliĉega ĉiuj generacioj.



Ĉar faris al mi grandaĵojn la Potenculo*,

Kaj sankta estas Lia nomo;


Kaj Lia kompatemo estas, de generacio al generacio*, sur la timantaj Lin.



Li elmontris la potencon de Sia brako*; dispelis fierulojn en la penso de ilia koro.


Li renversis potenculojn de ilia trono*, kaj altigis humilajn.

Malsatajn Li plenigis je bonoj*, kaj riĉulojn forsendis malplenaj.



Li zorgadis pri Israel' infano Sia*,
memorinte Sian kompatemon,

Kiel Li parolis al niaj patroj*, al Abraham' kaj al lia idaro por la centjaroj.




DE PROFUNDIS

PSALMO PRO LA MORTINTOJ.

EL la profundaĵo (de mia mizero), mi kriis al Vi, Sinjoro*. Sinjoro aŭskultu voĉon mian :

Atentaj fariĝu Viaj oreloj* al la voĉo de mia preĝego.




Se Vi la maljustaĵojn observos, Sinjoro*, Sinjoro, kiu ĝin elportos?

Sed en Vi estas la pardonemo*, kaj, pro Via leĝo, mi paciencie Vin atendis, Sinjoro.

Paciencie atendis animo mia en Lia parolo*.

Esperis animo mia en la Sinjoro.




De la matena gardo ĝis la nokto*,
esperu Israel' en la Sinjoro.

Ĉar en la Sinjoro estas la kompa-
temo*, kaj riĉa en Li elaĉetemo.

Kaj Li men elaĉetos Israel'on*, el
ĉiuj liaj maljustaĵoj.

Ni preĝu — Kreinto kaj Elaĉetinto
de ĉiuj fideluloj, Dio, donacu al la ani-
moj de Viaj servantoj kaj servantinoj
pardonon de ĉiu peko, por ke la libe-
rigon, kiun ili ĉiam deziregis, ili ricevu
per piaj petegoj : Vi, kiu vivas kaj
reĝas en la centoj da centjaroj. Amen.



MISERERE


PSALMO DE PENTO.

KOMPATU al mi, Dio, laŭ Via granda
kompatemo*; kaj, laŭ la senlimeco

de Via pardonemo, elviŝu maljustaĵon mian.

Pli kaj pli lavu min de maljustaĵo mia* kaj de mia peko purigu min.

Ĉar mian maljustaĵon mi konas*, kaj mia peko estas antaŭ mi ĉiam.




Kontraŭ Vi sola mi pekis, kaj la malbonon antaŭ Vi — mi faris* : tiel ke Vi estos justa en Viaj paroloj, kaj venkos en Via juĝo.




Jen mi ja en la maljustaĵo estis embriigita*, kaj en la peko min embriigis patrino mia.

Jen Vi ja la verecon amas*; la malklarajn kaj sekretajn aferojn de Via saĝeco Vi malkovris al mi.



Vi ŝprucigos sur min per la hisopo,
kaj mi puriĝos*; Vi lavos min, kaj pli
blanka ol neĝo mi fariĝos.

Vi aŭdigos al mi ĝojon kaj agrabla-
ĵon*; kaj ĝojegos miaj ostoj humiligitaj.




Deturnu la vizaĝon de miaj pekoj*:
kaj ĉiujn elviŝu miajn maljustaĵojn.

Koron puran kreu en mi Dio*, kaj
rektan spiriton renovigu en interno
mia.

Ne forĵetu min de antaŭ Vi*, kaj spi-
riton sanktan Vian ne forprenu el mi.

Redonu al mi la ĝojon de Via savo*,
kaj per spirito potenca fortigu min.




Mi instruos la maljustulojn pri vojoj
Viaj*, kaj la malpiuloj sin konvertos al
Vi.

Liberigu min de l'sango verŝita, Dio,


Dio de mia savo* : kaj lango mia pri-
kantos justecon Vian.

Sinjoro, miajn lipojn Vi malfermos*,
kaj mia buŝo proklamos laŭdon Vian.




Ĉar, se Vi estus volinta oferadon,
certe mi ĝin donus*; per bruloferoj Vi
ne kontentiĝos.

Oferado al Dio estas animo dispre-
mita (de pento)*; koron disrompitan kaj
humiligitan Vi ne malŝatos, Dio.



Bonfaru al Cion', Sinjoro, en Via
bonvolo*, por ke estu konstruitaj la
muroj de Jerusaleml'.

Tiam Vi akceptos oferadon de jus-
teco, oferdonojn kaj bruloferojn*; tiam
bovidojn oni metos sur Vian altaron.



Psalmo 109.

ETERNA NASKO DE KRISTO;

LIA REĜECO KAJ PASTRECO.

LA Sinjoro diris al mia Sinjoro* :
« Sidigu je dekstro mia.

Dum mi faros el Viaj malamikoj*
skabelon por Viaj piedoj. »

La sceptron de Via potenco la Sinjoro
elsendos (al Vi) el Cion'* : regu meze
de Viaj malamikoj.


Kun Vi (estos) la princeco en la tago
de Via potenco, en la briloj de l'sank-
tuloj* : el internaĵo mia, antaŭ la stelo
matena, mi Vin naskis.

Tion ĵuris la Sinjoro kaj ĝin ne pen-
tos* : Vi estas pastro por eterne laŭ
la maniero de Melkisedek'.


La Sinjoro (estos) je Via dekstro* ;
dispremos reĝojn en la tago de Sia
kolero.

Li juĝos inter la nacioj, plenigos ruinojn* : disrompos kapojn sur tero multthoma.

El torento en vojo Li trinkos* tial Li levos la kapon.



Gloro al la Patro, kaj al la Filo, kaj al la Spirito Sankta — Kiel estis en la komenco, nun (estu) kaj ĉiam, kaj en la centoj da centjaroj. Amen.



EL LA EVANGELIO DE SANKTA JOHANO.

EN la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis en Dio, kaj Dio estis la Vorto. Tiu ĉi estis je l'komenco en Dio. Ĉio per Li mem fariĝis; kaj sen Li mem fariĝis nenio, kio fariĝis. En Li mem estis vivo, kaj la vivo estis la lumo de l'homoj : kaj la lumo en la

mallumo brilas, kaj la mallumo Lin ne komprenis.


Estis homo sendita de Dio, nomata Johano. Tiu ĉi venis por atesto, por atesti pri la lumo, por ke ĉiuj kredu per li. Ne estis li la lumo, sed devis atesti pri la lumo. Tiu estis la vera lumo, kiu lumigas al ĉiu homo venanta en tiun ĉi mondon. En la mondo Li estis, kaj la mondo per Li mem estas farita : kaj la mondo Lin ne konis. En la proprajon Li venis, kaj la Siaj Lin ne akceptis. Sed ĉiuj ajn, kiuj Lin akceptis, Li donis al ili povon fariĝi infanoj de Dio, al la kredantaj en Lia nomo ; kiuj ne el sango, nek el volo de korpo, nek el volo de viro, sed el Dio naskiĝis. **Kaj LA VORTO FARIĜIS KORPO,** kaj loĝadis inter ni (kaj ni vidis Lian gloron, kvazaŭ gloron de sol-filo ricevitan de patro) plena je favoro kaj vero.



METODO POR LA MISTEROJ


DE L'ROZARIO

METODO facila permesas unuigi sin kun la misteroj de Nia Sinjoro kaj de l'Sankta Virgulino, dirante la Rozarion. Ĝi konsistas : aldoni, post la vorto Jesuo de « Mi Vin salutas, Mario », unu frazon, kiu esprimas la apartan misteron honorotan. Nature, tiu frazo ŝanĝiĝas en ĉia deko. Ekz... : la frukto de Via ventro Jesuo, kiun virga Vi embriigis.




ĜOJAJ MISTEROJ.

1. Kiun virga Vi embriigis.
2. Kiun Vi portatis vizitante Elizabet'on.
3. Kiun virga Vi naskis.
4. Kiun Vi prezentis en la sanktejo.
5. Kiun Vi retrovis en la sanktejo.



DOLORAJ MISTEROJ.


1. Kiu pro ni sangon ŝvitis.
2. Kiu pro ni estis vipita.
3. Kiu pro ni estis krionta per dornoj.
4. Kiu pro ni krucon portadis.
5. Kiu pro ni estis krucumita.



GLORAJ MISTEROJ.

1. Kiu reviviĝis el la mortintoj.
2. Kiu supreniris en la ĉielon.
3. Kiu sendis la Spiriton Sanktan.
4. Kiu Vin alprenis al si.
5. Kiu Vin kronis en la ĉielo.

(El la « *Pieux Helléniste* »,
du chanoine CONGNET.)



LANGUE
INTERNATIONALE AUXILIAIRE
ESPERANTO

—
ALPHABET

▼▼▼

Aa, Bb, Cc, Ĉĉ Dd, Ee, Ff,
â b ts (tsar) tch (tchèque) d é f

Gg, Ĝĝ, Hh
g dur (gant) dj (adjutant) h légèrement aspiré

Ĥĥ, Ii, Jj, Ĵĵ, Kk, Ll,
h fortement aspiré i y (yeux) j k l

Mm, Nn, Oo, Pp, Rr, Ss, Ŝŝ,
m n ô p r ss, ç, ch (chat)

Tt, Uu, Ŭŭ, Vv, Zz.
t ou u bref v z


(dans l'allemand "laüt")

REMARQUE I. — Pas de lettre muette;
pas de nasale. *Exemple* : amas = âmâce;
foiro = fô-i-rô; trouzi = trô-ou-zi; regno =

régue-nô; ombro = ôme-brô; aj, ej, oj, uj =
â-ye, é-ye, ô-ye, ou-ye prononcés en une
seule émission de voix, comme les syllabes
soulignées dans **paille**, **oseille**, **boyard**,
fouille. Aǔ, eǔ, forment diphtongue; mettez
donc le moins de temps possible entre le
son â et le son ou : aǔdi, leǔtenanto —
àoudi, léouténâne-to.

REMARQUE II. — L'accent tonique se
place toujours sur l'avant-dernière syllabe.


Élevez donc la voix et appuyez bien sur
cette syllabe, comme nous vous l'indiquons
par des caractères différents, dans les mots
qui suivent : Fenestr'o trouz'i, foir'o, **Di'o**,
antaǔ, **hodiaǔ**, **kiel**, **kiu**.



SIMPLES APERÇUS

SUR LA GRAMMAIRE, LE DICTIONNAIRE
ET LA FORMATION DES MOTS

Simpla, fleksebla, belsona, vere internacia en siaj elementoj, la lingvo Esperanto prezentas a la mondo civilizita la sole veran solvon de lingvo internacia; ĉar, tre facila por homoj nemulte instruitaj, Esperanto estas komprenata sen peno de la personoj bone edukitaj. Mil faktoj atestas la meriton praktikan de la nomita lingvo.



GRAMMAIRE

16 règles invariables

appries en une demi-heure, une heure au plus.

CARACTÉRISTIQUES

- O** marque le *substantif*.
Ex. : patro — père.
- A** marque l'*adjectif*.
Ex. : patra — paternel.


- E** marque l'*adverbe*.
Ex. : *patre* — paternellement.
- J** marque le *pluriel*.
Ex. : *bonaj patroj* — bons pères.
- N** marque le *complément direct* et le *lieu où l'on va*.
Ex. : *mi amas la patron* — j'aime le père ; *li iras Romon* — il va à Rome.
- As** marque le *présent*.
Ex. : *li amas* — il aime.
- Is** marque le *passé*.
Ex. : *ni amis* — nous avons aimé.
- Os** marque le *futur*.
Ex. : *vi amos* — vous aimerez.
- Us** marque le *conditionnel*.
Ex. : *și amus* — elle aimerait,
- U** marque l'*impératif-subjonctif*.
Ex. : *venu* — venez ; *li venu* — qu'il vienne.
- I** marque l'*infinitif*.
Ex. : *esti* — être ; *ami* — aimer.
- Ant** marque le *participe présent actif*.
Ex. : *faranta* — faisant ; *farante* — en faisant.
- Int** marque le *participe passé actif*.
Ex. : *farinta* — ayant fait.
- Ont** marque le *participe futur actif*.
Ex. : *faronta* — devant faire.

- At** marque le *participe présent passif*.
Ex. : *amata* — étant aimé.
- It** marque le *participe passé passif*.
Ex. : *amita* — ayant été aimé.
- Ot** marque le *participe futur passif*.
Ex. : *amota* — devant être aimé.

Ce procédé de spécification, emprunté à nos langues dans la plus large mesure possible, est le **seul qui ne tombe pas dans un complet arbitraire**; il est aussi de beaucoup, au point de vue international, le plus rationnel et le plus simple.

Les cinq premières caractéristiques fixent *parfaitement* la nature grammaticale, le nombre et le rôle, dans tous les mots variables autres que le verbe.

Les douze dernières résolvent d'une façon *absolument complète* toutes les difficultés de la conjugaison. Notons que les six participes donnent une infinité de substantifs par la simple substitution de *o* à *a*.



DICTIONNAIRE

formé d'éléments pris à nos langues

d'après l'internationalité acquise.

SPÉCIMEN DES ÉLÉMENTS

Atomo, aksiomo, formo, adresio, vagono, doktoro, komedio, telegrafo, teatro, tabako, filozofio, literaturo, scienco, komerco, fluto, violonçelo, filologio, poŝto, fosforo, metro, poezio, vitriolo, tragedio, minuto, barko, proklami, danci, etc..., tout à fait internationaux dans le monde civilisé.

Pura, muso, ankro, honesta, riça, muskolo, asigni, flamo, marmoro, anonci, faceto, juna, masto, floro, anizo, deviso, etc..., communs à 5, 6, 7 langues, l'internationalité la plus grande qui existe pour ces éléments.

Domo, vidi, ne, fingro, fiŝo, ŝuo, melki, persiko, mono, stabo, sendi, merito, nesto, sako, profiti, okupi, onklo, parto, lipo, inviti, etc..., communs au moins à deux

grandes langues de l'Europe, et parfois latins. Encore la plus grande internationalité possible pour ces éléments.

Sed, tamen, apro, apud, brako, dekstra, dorso, proksima, cetera, oleo, nek, muta, etc..., internationalité latine et parfois néo-latine, la plus grande dont on dispose pour ces éléments.

L'internationalité la plus grande possible dans les éléments formateurs, seul procédé rationnel pour **atteindre le plus de gens possible**, est donc bien la grande loi inspiratrice de l'*Esperanto*.

Une langue internationale, devant être évidemment formée d'éléments internationaux, ne peut suivre une autre voie, sans tomber dans l'arbitraire et *sans rendre à tous plus difficile l'étude et l'acquisition de l'organe commun*.

D'ailleurs, serait-il logique de n'y pas faire entrer les éléments déjà connus de tous les civilisés ou d'une très grande partie d'entre eux, les éléments déjà totalement ou partiellement internationaux?

FORMATION DES MOTS

Par les caractéristiques. — *Parolo* parole, *parola* oral, *parole* verbalement, *paroli* parler. *Kolero*, *kolera*, *kolere*, *koleri*. — *Morti*, mourir, *la mortanto*, le mourant, *la mortinto*, le défunt. — *Legi* lire, *la leganto* le lecteur. — *Krei* créer, *la kreinto* le créateur. — *Ofte* souvent, *ofta* fréquent.

Par la réunion des éléments. — *Eniri* entrer (*en* dans, *iri* aller); *eliri* sortir (*el* hors de, *iri* aller); *alporti* apporter (*al* vers, à, *porti* porter); *okulvitro* lunettes (*okul* œil, *vitro* verre); *stacidomo* gare (*staci* station, *domo* maison).

Par les affixes. — **Mal** donne les *contraires* et soulage ainsi la mémoire d'une infinité de mots. Ex. : *honesta* honnête, *malhonesta* malhonnête; *ami* aimer, *malami* haïr. — **In** donne un correspondant féminin à *tout* être mâle et épargne l'étude des noms d'*êtres féminins*. Ex. : *kuzo* cousin, *kuzino* cousine; *ĉevalo* cheval, *ĉevalino* jument. — **Ist** indique la *profession*. Ex. : *artista* artiste; *botisto* bottier. — **Il** marque l'*instrument*. Ex. : *kudri* coudre, *kudrilo*

aiguille ; haki hacher, hakilo hache. — **Ig** rendre, faire... Ex. : forta fort, fortigi fortifier ; morti mourir, mortigi faire mourir, tuer. — **Em** marque le *penchant* à..., l'*habitude* de... Ex. : babili babiller, babilema babillard ; ridi rire, ridema rieur.

Par une trentaine de préfixes ou de suffixes analogues, à sens propre et nettement définis, l'*Esperanto* donne à son dictionnaire une richesse incroyable, tout en épargnant à la mémoire l'étude d'une infinité de mots. Ceci ne veut d'ailleurs pas dire, comme certains l'ont **faussement** prétendu, qu'il est dans l'essence de la langue d'obliger les adeptes à former eux-mêmes les mots, mais simplement que les dictionnaires Esperanto-nationaux ou nationaux-Esperanto sont extrêmement légers à la mémoire, grâce aux principes fort simples de dérivation et de composition qu'on y trouve appliqués et greffés sur les éléments internationaux.

Mais ce qui distingue essentiellement l'*Esperanto*, c'est que grâce à une structure toute spéciale, **il peut être compris sur-le-champ**, rien qu'à l'aide du dictionnaire¹, *sans obliger à la lecture préalable d'une seule ligne de grammaire*. Ce fait, d'une importance capitale au point de vue pratique, n'est possible en aucune autre langue. Dans tous nos idiomes, en effet, il faut une préparation plus ou moins longue, une étude

1. Ce fait est démontré expérimentalement, sur cinq lettres, dans la brochure *L'Esperanto, seule vraie solution de la langue internationale auxiliaire*.

assez avancée de la grammaire, pour que le dictionnaire puisse servir. Sinon il ne donnera même pas le sens d'un texte de deux lignes. La compréhension immédiate met donc absolument l'*Esperanto* hors de pair, non seulement à l'égard des langues naturelles, mais à l'égard même de tous les essais *théoriques*, de toutes les ébauches de langues artificielles, dites internationales, et publiées avant ou après lui. Nul autre système ne présente cette qualité décisive, et nul autre ne pourrait l'offrir, avec autant de simplicité, qu'en pastichant l'*Esperanto* d'une manière évidente.

Traduite en 20 idiomes différents, la langue est employée d'un bout du monde à l'autre par des hommes de nationalités les plus diverses. Elle sert, non pas seulement aux communications écrites, mais encore aux communications orales. Quatre revues mensuelles, **150 ouvrages** originaux ou traduits et des milliers de lettres en font foi.

Si l'*Esperanto* n'est pas plus connu chez nous, cela tient à ce que ses propagateurs mêmes ont voulu, surtout après l'échec du Volapuk et le discrédit qu'il a jeté sur l'idée, procéder d'une façon silencieuse et ne se présenter, surtout au monde savant, que les mains pleines de faits probants et absolument incontestables. Douze ans de fonctionnement, où l'*Esperanto* a servi à tous les Espérantistes du monde dans les rôles multiples d'une langue vivante, leur permettent aujourd'hui d'affirmer, *sans aucune restriction*, qu'il est bien réellement la vraie solution de la langue internationale auxiliaire, complément nécessaire de tous nos progrès matériels.

MAX MULLER. « *Je dois certainement attribuer la première place à la langue Esperanto parmi ses concurrentes.* »

LÉON TOLSTOÏ : « *Les sacrifices que fera tout homme de notre monde européen, en consacrant quelque temps à l'étude de l'Esperanto, sont tellement petits, et les résultats qui peuvent en découler tellement immenses, qu'on ne peut pas se refuser à faire cet essai.* »

Au mois de novembre 1899, un ingénieur militaire russe, M. F. Postnikov, venait voir, à Épernay, le Président et le Secrétaire de la Société pour la propagation de l'Esperanto, Français l'un et l'autre. Là, en présence de parents, d'amis et de connaissances, qui peuvent en témoigner, ils conversèrent tous trois pendant plus de douze heures sur des sujets les plus divers, couramment rapidement même, grâce à l'Esperanto et à l'Esperanto seul, puisqu'ils n'avaient, pour communiquer entre eux, aucun autre organe commun.

Enfin, M. F. de Kanalossy-Lefler, Russe lui aussi, écrit à une revue de Paris, *Concordia* : « *L'étude de l'Esperanto m'a pris quinze jours, et j'en suis absolument maître... Je peux nommer au moins une vingtaine de mes compatriotes qui, ne connaissant aucune langue étrangère et ayant tout au plus reçu une instruction primaire, ont appris l'Esperanto en trois ou quatre semaines et en usent pour leur correspondance.* »

EN VENTE :

A LA LIBRAIRIE HACHETTE & C^{ie}
79, boulevard Saint-Germain, PARIS

Collection approuvée par le Docteur Zamenhof
Auteur de la *Lingvo internacia Esperanto*

Grammaire et exercices de la Langue internationale Esperanto, par L. DE BEAUFONT. — Prix : 1 fr. 50.

Dictionnaire Esperanto-Français, par LE MÊME. — Prix : 1 fr. 50

Dictionnaire Français-Esperanto, par LE MÊME. — *En préparation*

Commentaire sur la Grammaire Esperanto, par LE MÊME. — Prix : 2 fr.

Texte synthétique des règles, préfixes, suffixes et expressions de l'Esperanto, (*texte Esperanto avec traduction française*), par LE MÊME. — Prix : 0 fr. 50.

L'Esperanto en dix Leçons, par TH. CART et M. PAGNIER. — Prix : 0 fr. 75.

Hamleto, de Shakespeare. — Prix : 2 fr.

Esperantaj Prozaĵoj. — Prix : 2 fr. 50.

AU SECRÉTARIAT DE LA SOCIÉTÉ

POUR

LA PROPAGATION DE L'ESPERANTO :

10, place de la Bourse, PARIS

L'Esperanto, seule vraie solution de la langue internationale auxiliaire, par L. DE BEAUFONT. — Prix : 0 fr. 20 *franco*; chaque dizaine d'exemplaires, 1 fr. 25 *franco*.

Revue mensuelle de **L'Esperantiste**, organe de la *Société p. p. Esperanto* : numéro spécimen avec les Statuts de la Société contre 0 fr. 30 en timbres-poste.

Paris. — Imp. DEVALOIS, avenue du Maine, 144.